

Esperanto-Kulturo en nia edukado

Kontribuo de Stefan MacGill al la
Seminario pri Aktivula Maturigo, numero 76

La 9a kaj 11a de aŭgusto

La nuna prezentado de lundo, la 9a de aŭgusto



Enkonduko



- * Plektu la lingvo-lernadon kun kontaktado kun la kulturo.
- * La prezentaĵoj estu variaj, frandindaj kaj konvenaj al la nivelo.
- * Memoru, ke ni instruas pli ol nur lingvon.
- * Ni rivelu la kulturan kaj transnacian mondon, kiun tiu lingvo potencie malfermas.

Kulturo laŭ la niveloj



- * Prezentoj por infanetoj
- * Prezentoj por element-lernejaj junuloj
- * Prezentoj por altlernejanoj
- * Prezentoj por trianivelaj studentoj

- * La proponoj por la niveloj estas mikseblaj!

Kulturo laŭ la sensoj






- * Aŭskultu por sorbi: muzikon, literaturon, modelajn dialogojn
- * Rigardu por sorbi: arton, librojn, fotojn artajn kaj komunumajn
- * Parolu por ekzerci: dialogoj, rolludoj, laŭtlegado de verkoj.
- * Gustumu: naciajn manĝ-specialaĵojn (ILEI-Kongresoj)
- * Produktu: desegnadon, plastikajn artojn, verkadon...

Bazaj kursoj por infanetoj



- * Prezento de infanlibroj – komuna legado aŭ legigo.
- * Komuna kantado de simplaj kantoj
- * Aŭskultigo de muziko en Esperanto
- * Ege bazaj lecionetoj pri la historio de la lingvo
- * Simile bazaj informoj pri kongresoj kaj renkontiĝoj
- * Stimulo de parolado en Esperanto, sed multo kultura venos en la nacia lingvo.

Infan- libroj



- * Rete akireblaj infanlibroj:
<http://www.lpthe.jussieu.fr/~jacobsen/infanlibroj/>
- * Listo de titoloj: <https://familioj.miraheze.org/wiki/Libroj>

Kursoj por elementaj lernejoj

- * Instruista laŭtlegado de verkoj konvenaj al tiu aĝgrupo
- * Vizito al Esperanta biblioteko
- * Munto de ekspozicio de Eo-libroj kaj artifaktoj
- * Pli maturaj lecionoj pri Eo-historio kaj la nuna komunumo
- * Starigo de transnaciaj kontakto kun alilandaj kursanoj, ekz. de Zomo
- * Altigo de la proporcio de Esperanto en la lecionoj, ankaŭ pri kulturaj temoj

Svisa privata lernejo



Vizito al la privata lernejo 'La Granda Ursino' en La Chaux-de-Fonds ene de AMO 35

Kursoj en altlernejoj



- * Similaj programoj kiel por la elementa nivelo, sed pli altnivele.
- * Invitado de konataj esperantistoj viziti la klason.
- * Prezento de bazaj informoj pri UEA, ILEI, TEJO ks.
- * Pretigo de projektoj; lernejoj mem prezentu 'lecionojn'
- * Maksimuma uzo de Esperanto en la kurso, eĉ por klarigoj. Kun rediro laŭbezone nacilingve.

Kurso en Togolando



Universitataj kursoj



- * Temas pri ĉiaj trianivelaj instancoj.
La kondiĉoj kaj ebloj ege varias.
- * Libro-recenzoj pretigitaj de lernantoj.
- * Informoj pri kulturaj eventoj, kiaj Arkones, KEF ks.
- * Konigo de bonaj kulturaj retejoj: Vinilkosmo, Impeto eldonejo.
- * Emfazu la eblojn por perado de aliaj kulturoj.
- * Se la edukejo havas specialigon, emfazu tion.
- * Por teknikaj kolektoj, konigu la laborojn de KAEST, STEB ks.
- * Por lingvaj specialiĝoj, emfazu interlingvistikon
- * Eluzu la reton de universitatoj kaj pliaj triagradaj lernejoj.

Post-diplomaj studoj en Poznano



ADAM MICKIEWICZ
UNIVERSITY
IN POZNAŃ



Sensoj: Aŭskultu muzikon, literaturon, dialogojn



Kajto aperas vive tra la mondo.

Triopo en la kongreso en Lillo.



Sensoj: rigardu arton, librojn, statuojn, fotojn



Statuo en la Esperanto-urbo Herzberg-am-Harz.



Zamenhof kaj Klara en Barcelono, 1909

Sensoj: parolu

per dialogoj, rolludoj, lautlegado



- * Rolludo dum AMO 10 en Brusono, Italio en 2015.
- * Partoprenanto en la Oratora Konkurso dum VK 2 de UEA en 2021.

Sencoj: produktu ekspoziciojn, afiŝojn, verkojn



Afiso kreita en la lernejo Ursino honore al la 150 numeroj de Juna Amiko

Kulturaj konoj en ekzamenoj




La ekzamenoj de UEA/ILEI ja havas tion. Pluraj landaj ekzamenoj havas kulturajn enhavojn, ekz. en Francio.

La KER-ekzamenoj testas nur komunik-kapablon.

Tasko por ILEI: Evoluigo de memstara ekzamenado la kulturaj kapabloj por KER-sukcesintoj.



Konigaj prezentoj – varbu por la kurso!



- * Antaŭ ol lanĉi kurson, bonas prezenti la lingvon kaj ĝian kulturon al potencialaj kursanoj.
- * Tio evidente okazos nacilingve.
- * Povos aperi eksterlanda gasto kun laŭbezona tradukado.
- * Emfazu la kulturajn elementojn, aŭdigu muzikon, montru librojn, prezentu kongresojn.
- * Tuŝu la historion, sed ne komence. La kerna komenca mesaĝo: Esperanto estas lingvo por la nuntempo kaj la futuro.

La valoro de rolludoj

- * Studentoj mem montru siajn dramecajn kapablojn.
- * Rolludado spronu la simplan parolan komunikan kapablon.
- * Komencu per lernitaj dialogoj, poste donu tre bazajn konatajn situaciojn.
- * Nur post multa preparaj paŝoj kaj plia luingvolernado pluiru al pli ampleksaj rolludoj.
- * Sentu la entuziasmon aŭ hezitanon pri rolludoj.
- * Ne interrompadu rolludon por korekti lingvajn erarojn – notu ilin por poste.

Konklude



- * Integru kulturajn kaj movadajn konojn kun la lingvo-lernado
- * La kursoj estu variaj kaj allogaj, precipe se temas pri maldeviga kurso
- * Ne hezitu prezenti kulturajn erojn super la lingva nivelo de la lernantoj.
- * Permesu al lernantoj aŭskulti ‘la muzikon de la lingvo’.
- * Vidigu la valoron de la lingvo per riĉa kursa programo